

**NIA VOĈO**  
**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4<sup>B</sup>-Ext. 28005 Madrid  
(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3<sup>o</sup>-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz

**NOVEMBRO 2004**

**AUGUSTO CASQUERO RICEVIS LA PREMION "ADA SIKORSKA"**

En Salou, la 3-an de oktobro, estis unuafoje atribuita la internacia Premio "Ada Sikorska Fighiera". Ĝin ricevis Augusto Casquero el Valencio pro sia plurjardeka sindediĉa agado por Esperanto en diversaj landoj kiel kurs-gvidanto, preleganto, organizanto de multaj naciaj kaj internaciaj kongresoj.

La transdono okazis en la kadro de la 12-a Internacia E-Semajno de Kulturo kaj Turismo, malfermita de loka urbestro : centoj da esperantistoj el sep landoj partoprenis en la Semajnaj programoj (prelegoj, debatoj kaj ekskursoj). La venonta ĉiujara premio, dediĉita al la memoro de Ada -kiu dum 35 jaroj redaktis kaj eldonis la tiaman sendependan "Heroldo de Esperanto"- estos asignita en aŭtuno 2005. (raporto de Gian Carlo Fighiera)

Madrida Esperanto-Liceo, kiu aktive promociis la kandidatecon de Augusto Casquero al tiu nova premio, kreita de Gian Carlo Fighiera por atribuo okaze de la ĉiujara Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo, plej ĝoje esprimas sian gratulon al Aŭgusto, kiu nun profesoras en la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz, Pollando.

**LA INTERNACIA E-SEMAJNO DE LA KULTURO KAJ TURISMO EN SALOU**

En Salou, bela urbo de la "Orumita Marbordo", okazis nia "Semajno" 2004. Centoj da gesamideanoj alvenis al nia alvoko, 49 el ili eksterlandanoj. Ekde Madrido partoprenis Angelita Sanz. Nia "Semajno" disvolviĝis en plej agrabla etoso.

La dimanĉon 3-an de Oktobro okazis ĝia inaŭguro, kun ĉeesto de la urbestro s-ro Esteve Ferran i Ribera. Posttagmeze oni asignis la Premion "Ada Sikorska Fighiera", kiu vere estis la stelo de nia "Semajno". Ĝin ricevis Augusto Casquero el Valencio pro sia plurjardeka sindediĉa agado en la Esperanta movado, ĉu enlande, ĉu eksterlande. Bedaŭrinde li troviĝis en Pollando instruante la hispanan lingvon kaj li ne povis ĉeesti la eventon. Fine, nia kara Gian Carlo Fighiera emocie parolis pri sia bedaŭrata edzino kaj ŝiaj streboj por Esperanto, sub la temo "Esperanto laŭ vojo de Ada Sikorska". Nepre ni devas aldoni, ke la Premio naskiĝis kun daŭriga celo, do vi jam povas anonci vian/viajn kandidatojn.

Okazis prelegoj de Manuel de Seabra, Marc Cuffez, Kristoforo Fettes, Giordano Moya kaj Wolfgang Gunther. Salvador Aragay gvidis superan kurson, kiu estis ĉeestata de multaj "semajnuloj".

Antonio Marco Botella prelegis pri "La unuaj jaroj de Esperanto en Katalunio". Lia prelego estis specimeno de libro 400 paĝa verkita de li, kiu verŝajne baldaŭ estos eldonita.

Nepre menciinda estis la aktorado de la trupeto el Montpelier "ĜO - JO" kiu amuzigis nin per siaj skeĉoj kvazaŭ ili estus profesiuloj. Permesu al mi mencii la subitan naskiĝon de nova trupeto, sub la gvido de Rose Sanz, el Parizo. Ili ludis la lastan tagon diversajn skeĉojn rilatajn al programeroj de la "Semajno". (Ekstrakto el raporto de Luis Serrano)

**DU NOVAJ LIBROJ DE JORGE CAMACHO**

Ĉe la Eldonejo Bero, de Rotterdamo, aperis du novaj libroj de nia kara liceano Jorge Camacho. Temas pri la poemaroj "Saturno" kaj "Celakantoj". La fama membro de la ibera skolo Gonçalo Neves skribis pri ili: "Kontraston inter ĉiea, perpleksiga mikromondo kaj plene vivanta, mitokrea makrokosmo, la nun prezentata kolekto montras pli frape kaj detale, ol la antaŭa poemado de Camacho."

Laŭ informis Jorge Camacho, la libro "Saturno" (dulingva: esperanta kaj hispana), estas aĉetebla en Madrido en la oficejo de HEF (lunde kaj ĵaŭde vespere) kaj en la librovendejoj Antonio Machado, C/ Fernando VI, 17, Antonio Machado (en el edificio del Círculo de Bellas Artes), C/ Marqués de Casa Riera, 2, El Bandido Doblemente Armado, C/ Apodaca, 3 kaj Fuentetaja. C/ San Bernardo, 48.

**ESPERANTA PAĜO DE JUAN DEL CASTILLO**

Nia kara liceano Juan del Castillo kreis retpaĝon en kiu oni povas trovi interesajn elektronikajn ludojn. La paĝo aperas hispane kaj esperante, en la adreso: <http://arcade.ya.com/zamen/>

**CENTJARIĜO DE LA ESPERANTO-MOVADO EN KATALUNIO**

Eble estos surprizo por niaj legantoj scii ke ĝuste antaŭ 100 jaroj, en Novembro 1904, koincidis en la ĉarma nordkataluna urbeto Ceret (en la franca departemento Pyrénées Orientales), du fervoraj esperantistoj: Paul Berthelot, fondinto de la revuo "Esperanto" kaj la notario de Figueres Salvador Dalí, patro de la fama pentristo. En tiu urbeto ili fondis la unuan katalunan Esperanto-asociacion: l'Aplec Esperantista de Catalunya.

Tial oni festas ĉi-jare la centjariĝon de Esperanto en Katalunio, precize per la okazigo en Ceret de la 32a Kataluna Kongreso de Esperanto, dum la tagoj 30 kaj 31 Oktobro kaj 1 Novembro.

Estas antaŭvidita la partopreno de la eldonisto de La Ondo de Esperanto, Alexander Korĵenkov, de la fama verkisto kaj pedagogo Stefan MacGill kaj de Arno Lagrange, unu el la plej elstaraj aktivuloj por la esperanta versio de Vikipedio; ankaŭ oni ĝuos muzikon fare de la duopo Ĵomart kaj Nataŝa, de Ĵak le Puil kaj de la ensemblo Kaj Tiel Plu. [raportis D. Rodríguez]

**ETSUO MIYOSHI INVESTIS 50.000 \$ POR GRANDAJ ANONCOJ PRI ESPERANTO**

La japana mecenato Etsuo Miyoshi elspezis 50.000 dolarojn por publikigo de tutpaĝaj anoncoj pri nia lingvo en pluraj gravaj eŭropaj ĵurnaloj, i.a. "Le Monde". Aŭgusto Casquero informis pri la koncerna anonco en Pollando:

La 25an de septembro, en la pola gazeto "Rzeczpospolita", grandformata, probable la plej aĉetata en Pollando, aperis grandega artikolo pri Esperanto. Du trionojn de tiu granda paĝo okupas intervjuo de la pola ĵurnalisto-esperantisto Roman Dobrzynski al la japana industriisto, esperantisto, Etsuo Miyoshi, "reĝo de la gantoj", titolita "Kial mi investas en Pollando".

Tiu artikolo havis grandegan efikon. Amaso da poloj legis ĝin, agrable surpriziĝis konante, eble unuafoje, kio estas Esperanto, kaj vidante kiajn avantaĝojn ĝi havas, interalie por krei industriojn en Pollando, ege bezonataj, ĉar tiu fabriko estos konstruita en la bela kaj historia urbo Malbork, kie la procento de senlaboruloj estas 30 %.

En la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo okazis tuj poste studadsesion, kaj al la inaŭguro venis kelkaj ĵurnalistoj, kiuj volis havi pli da informoj pri Esperanto, kaj poste aperis diversaj artikoloj en polaj gazetoj, eĉ kun fotoj de la gestudentoj kaj profesoroj, kaj okazis kelkaj intervjuoj en radio, kaj eĉ informoj en televido. (Raportis Augusto Casquero)

**RETKURSO DE ESPERANTO DE MAILxMAIL KUNLABORE KUN HEF**

Rekomendu ĝin: <http://www.mailxmail.com/Idiomas/Esperanto.htm>

**HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO**

La Sekretario, Manolo Parra, deĵoras lunde kaj jaŭde vespere (18,30-21,00h), dum aliaj tagoj vi povas faksi aŭ telefoni al 91 446 80 79 aŭ kontakti rete [admin@esperanto-es.net](mailto:admin@esperanto-es.net)

**VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO**

Niaj konversacia-rondoj okazas ĉiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**

Asociación de Utilidad Pública Municipal

San Alejandro 6- 4ºB EXT

28005 Madrid